Each day the players receive a maximum of three questions about Esperanto (which vary at random): one each on the language, culture and movement. Only those who correctly answer at least one of the first two questions may choose to either stop there or continue playing with the chance to double their points or lose them all. If the player correctly answers the third question, his or her points will be doubled – but if the player answers incorrectly, he or she will lose all points scored that day!

Points accumulate throughout the month, and at the end of the month the winners can choose from among several prizes. There is an additional prize for the winner for the whole year. Prizes are provided mainly by the Edukado.net Foundation. However, many associations, publishers and authors have offered their works as well.

#### Number of registered users shot past 3,000

Risko has already aroused great interest: the game's popularity has greatly increased traffic at edukado.net, and has increased the number of the site's users. In fact, soon after an announcement about the game went out to lernu.net users, the number of registered users shot past 3,000!

The game was designed by Katalin Kovats, editor of edukado.net, and the 1,200 questions were written and entered by her and her Danish colleague Rude Andersen. The questions are often not easy: quotes, pairing of authors with their works, dates and events, word definitions, song recognition, mispronounced phonemes, etc.

The principal aim of this game, however, is not just amusement with interesting prizes, but is rather an educa-

## *Itala tribunalo malaprobas angligon de itala universitato*

*Multaj esperantistoj diskutas pri la demando, ĉu oni devas lukti kontraŭ la angla alingvo, pli ĝuste kontraŭ ĝia pli kaj pli profunda penetro al la ĉiutaga vivo en diversaj landoj.*

*Lige al tiu strategia demando estas interesa la verdikto de lombardia tribunalo kontraŭ la angligo de urba politeknika lernejo, kaj ĝia prijuĝo flanke de la tiea Itala Esperantista Junularo.*

La Lombardia Regiona Administra Tribunalo (RAT) akceptis la apelacion prezentitan de multaj profesoroj de la Milana Politekniko, kiuj kuraĝe kontraŭis la trudan kaj ekskluzivan angligon de la tuta studa programaro de tiu Milana Universitato. La senalternativa angligo de la magistras kursoj estas nun kontraŭleĝa. Temas pri malvenko de rektoro Azzone kaj de la fakultatestra Konsilio, kiu malfermas vojon al pluaj juraj iniciatoj kontraŭ lingva diskriminacio en la itala universitato.

Asocio Nitobe por Lingvaj Justeco kaj Demokrateco ([www.nitobe.it/eo](http://www.nitobe.it/eo)) favore bonvenigas tiun RAT-verdikton. Nun necesas daŭrigi la agadon por restarigi lingvan justecon en Italio, ĉetribunale kontesti la lingvan politikon de la Torina Politekniko, kiu pli pagigas la studentojn dezirantajn studi itallingve ol tiujn, kiuj studas anglalingve; kaj la lingvan politikon de la Venecia Ca' Foscari, kiu intencas malebligi enmatrikuligon de la studentoj neatingintaj anglalingvan B2-nivelon.

Szilvasi Laszlo

tional activity. Indeed, at the end of each day every player (who chooses this service) receives an e-mail message detailing his or her scored points and the incorrectly answered questions of the day (but without the answer). The player must then research the answer to the question in order to answer correctly if the question comes up again.

Risko will be an ongoing game, for months and years to come, and the editor hopes for large-scale participation. The game may be accessed at [www.edukado.net](http://www.edukado.net) (section 'ludoj'). □

## *Universitato de Esperanto*

La Universitato de Esperanto estas nova projekto por starigi universitat-nivelajn kursojn tute en Esperanto. Ĝi baziĝas sur la modeloj de la programoj angle nomataj *open*, kie la kursoj estas senpage disponeblaj per la interreto. La kursoj estas kompletaj, instruataj de rekonata fakulo kun doktordiplomo kaj universtata instruo-sperto, 40-horaj, sufiĉe ĝeneralaj, filmitaj kaj registritaj, kutime jam

instruataj en aliaj universitatoj, kaj okazas sub la licenco Kreiva Komunumo. Ili iĝos ĉies propraĵo kaj ili disponeblas por la eventuala kaj libera utiligado de AIS.

Nun estas tri studobjektoj. Unue, estas kurso, kiu pritraktas militon. Ĝi nomiĝas 'Alfronti militon', kaj estas instruata de

profesoro Ron Glossop. La dua estas kurso de profesoro Federico Gobbo nomita 'Historio kaj filozofio de la informadiko'. La tria estas 'Kurso pri astronomio kaj astrofiziko' farata de profesoro Amri Wandel.

Por pli da detaloj vidu en [www.universitato.info/index](http://www.universitato.info/index). □

Junulara Renkontiĝo en Kembrigo, Somera Festivalo, Drondoj) kaj internaciaj (Internacia Junulara Kongreso en Kijivo, Somera Esperanto-Studado en Slovakio, Internacia Junulara Semajno en Hungario). Kaj nun interesitoj povas legi pri tiuj aventuroj kaj la daŭra laboro de NoJEF ĉe ties nova retejo [nojef.org](http://nojef.org). Tie oni trovas multajn raportojn verkitaĵojn de la junuloj, kiuj ricevas subvencion – malgraŭ tio ke eble duono de la ricevintoj ne faras raporton, restas ĉe la reto multe da legindaj.

Mi rekomendas, kiel deirpunkton, filmeton pri Somera Esperanto-Studado kaj la Internacia Junulara Semajno fare de Rowland Goodbody ([nojef.org/links/goodbody-ses-2012](http://nojef.org/links/goodbody-ses-2012)) kaj artikolon pri la Edinburga kunkongreso fare de Rob Hawkins ([nojef.org/links/hawkins-bk-2012](http://nojef.org/links/hawkins-bk-2012)). Mi opinias, ke la kapabloj de pluraj tiaj talentaj junuloj donos al vi la saman bonan impreson kiel al mi.

Tim Owen

## NoJEF-raportoj nun rete

Kio okazas ĉe junularaj aranĝoj en Esperantujo? Mi imagas, ke la plimulto de nia membraro lernis Esperanton post sia junaĝo kaj do neniam partoprenis internaciajn renkontiĝojn. Personaflanke mi bonforte konatiĝis kun Esperanto sufiĉe junaĝe por plurfoje vojaĝi al eventoj por gejunuloj, ĉu Internaciaj Junularaj Kongresoj (frateto de la Universala Kongreso), ĉu Internaciaj Junularaj Semajnoj (ĉiam moviĝanta de unu urbo al alia en bela Hungario), ĉu al memstaraj aranĝoj.

Kelkfoje en miaj fruaj tagoj mi profitis de NoJEF por ĝui tiujn eventojn. La Norviĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo estis la ideo de Alderman de Norviĉo Edwin Dean kaj fondiĝis en 1967. Ĝia celo estas ebligi al gejunuloj per financa helpo partopreni diversajn Esperanto-aranĝojn. Hodiaŭ rajtas peti subvencion junuloj britaj aŭ loĝantaj en Britio por vojaĝi al Esperanto-aranĝoj kaj enlandaj kaj foraj.

Celante redoni ion al NoJEF kaj pluebligi al aliaj profiti kiel mi pasintec bonforte faris, mi akceptis peton de ĝiaj kuratoroj plenigi la ŝuojn tiel triste postlasitajn de la antaŭa sekretario David Kelso. Kaj do NoJEF ja daŭre funkcias, kaj junuloj partoprenis plurajn aranĝojn. Inter ili troviĝas britaj eventoj



La nova emblemo de NoJEF

(kongresoj en Edinburgo kaj Ramsgate, JEB-kunvenoj en Belfasto kaj Novkastelo, Brita

## Semajnfino ĉe Shallowford House: 'Course-You-Can'

De la 22a ĝis la 24a de februaro mi kaj tri aliaj komencantoj partoprenis en 'Course-You-Can' ĉe Shallowford House. Antaŭ la komenco de la kurso mi neniam renkontis iujn esperantistojn. Fakte mi estis eĉ iom nervoza. Tamen tuj, kiam mi alvenis, estis evidente, ke mi ne bezonis zorgi. Ĉiuj estis tre amikaj.

Malcolm Jones, nia instruisto, estis tre helpema kaj pacienca. Kvankam ni studis seriozajn gramatikajn aferojn, Malcolm uzis diversajn metodojn por fari niajn lecionojn amuzaj.

### Parolantaj literoj

Ekzemple, ni aktorizis en mallongaj teatraĵoj. Niaj roloj enhavis roboton kaj hundojn kaj eĉ parolantajn literojn! Ni ankaŭ ludis vortoludojn. Mi ricevis malplej multajn poentojn – sed, ne gravis.

La kurso estis certe utiliga kaj permesis al mi fariĝi sufiĉe memfida por paroli Esperante kun aliaj homoj.

Samtempe, 'Drondo' kaj 'Ni Muzikum' okazis en Shallowford House. Kvankam la ĉeestantoj de tiuj aranĝoj estis spertaj esperantistoj, la tri grupoj

Fotis Paŭlo Gubbins

renkontiĝis ofte en la manĝo-ĉambro kaj la trinkejo.

Ni havis multajn amikajn kaj amuzajn konversaciojn en la angla kaj Esperanto. Ni ankaŭ havis du organizitajn agadojn kune. Unue, ni aŭskultis interesan prelegon en la angla de Tim Owen pri la historio de Esperanto. Tim eĉ rakontis al ni pri la unua (kaj espereble lasta) Esperanto-murdo!

Due, la talentaj muzikistoj kaj tradukantoj de la grupo 'Ni Muzikumu' aperis antaŭ ni ĉiuj.

Laste, mi devus diri al vi pri Shallowford House – granda domo kun belaj ĝardenoj. La tuta loĝejo estis pura kaj komforta. Niaj manĝoj estis bongustaj kaj abundaj.

Certe mi havis bonegan semajnfinojn, plenan de lernado, manĝado, amuzo kaj amikeco.

Jean Jamieson



Atente aŭskultas sian instruiston (de maldekstre) kursanoj Roger Cookson, John Tierney, Jean Jamieson kaj David Mannock.

## 'Ni Muzikumu' kaj 'Drondo' – "Kia agrabla kunlaboro!"

Estis granda plezuro reveni al la varma bonveno ĉe Shallowford House pasintan februaron.

*Drondo* okazis en la sid-ĉambro kie, komferte malstreĉiĝante en brakseĝoj kaj sofoj, partoprenantoj ĝuis diskutrondon. Tim Owen kaj Ed Robertson laŭvice gvidis sesiojn. Kiam temis pri neordinaraj temoj, la vortaro *PIV* rondiris. Elektitaj temoj estis diversaj, kaj mi antaŭĝuis diskuton pri moralaj problemoj rilate al viandmanĝado – ĉar mi sciis, ke inter la grupo estas homo, kiu ne manĝas viandon kaj alia, kiu ne manĝas legomojn.

Tamen, mi jam decidis ĉeesti sesion kun la grupo *Ni Muzikumu*. Enirante la bibliotekon, mi vidis scenon de kvietaj laboroj. Jack prilaboris muzikon por sia

ukulelo, Heleno tradukis tekstojn por kantoj, kaj Terry faris ion nekredible lertan per sia komputilo. Li kapablas enkomputiligi muziknotojn – peniga tasko – poste ludi la melodion tra laŭtparoliloj de sia komputilo, kaj ŝanĝi la sonon laŭ diversaj simuligaj instrumentoj.

Mi jam tradukis en Esperanton tekston de la kanto *Kiam mi aĝos sesdek kvar*. Tuj, Jack proponis akompani min per sia instrumento, kaj eĉ prilaboris 'buŝan trombonon' por interstrofoj (tre amuzaj por la aŭskultantoj). Heleno kaj Terry sugestis plibonigon de la teksto kelkloke. Terry enkomputiligis la vortojn, kiujn li montris sur vanda ekrano dum la koncerto poste – tre utila por la postkomencanta grupo *Course-You-Can*.

Kia agrabla kunlaborado!

Antaŭ lunĉo dimanĉon, la muzikistoj prezentis etan koncerton por demonstri tion, kion ili faris dum la semajnfino. Heleno prezentis, kaj instigis homojn kunkanti kelkloke.

La tri studrondoj renkontiĝis dum manĝohoroj kaj kafaŭzoj. Sabaton posttagmeze, multaj promenis en la ĉirkaŭaĵo – bonŝance, la vetero ne estis malagraba aŭ malvarma.

Ni spertis profitodonan kaj ĝuindan semajnfinojn kaj bonvenan paŭzon meze de vintro. Multajn dankojn ni ŝuldas al la gvidantoj Jack Warren, Malcolm Jones, Tim Owen kaj Ed Robertson, kaj al Viv O'Dunne en la oficejo, kiu organizis ĉion 'malantaŭ la kulisoj'.

Joyce Bunting

# *Gassy Marin*

## *From wild revolutionary to loyal subject*

*The history of Esperanto is filled with 'characters'. One neglected figure is Eugène Gaspard (Gassy) Marin (1883–1969), who receives only a passing mention (under Sudan) in the two-volume Enciklopedio de Esperanto (1933–4).*

Marin was born in Belgium into a well-to-do family, and in his youth he became an anarchist and a ferocious defender of Esperanto, teaching the international tongue in an anarchist colony in his homeland. Marin fled to England in 1914 to avoid military service, and joined the anarchist-Tolstoyan Whiteway Colony near Gloucestershire where he lived until his death – when he was not on his travels.

In 1928 Marin undertook a journey around the world, initially by bicycle. His trip through Europe, East Africa, India (where he met Gandhi), Sumatra and China was to last ten years. He stopped his unplanned travels to mingle with local people in order to learn how they lived. He accumulated a mass of ethnological and

sociological information, recorded in many handwritten notebooks which are unfortunately still unpublished. Marin's (non-Esperanto) papers are dispersed between the Imperial College Science Museum Library in London, and the International Institute of Social History (IISH), in Amsterdam.

Remarkably little is available about or by this remarkable man in English or Esperanto. He is mentioned in some historic Esperanto magazines but most of these have not been scanned and are unavailable to today's readers.

I have had the pleasure over recent months of leafing through some of Marin's accounts of his travels. He was a keen observer and provides great details of what he saw and heard. He lived in, for example, an Arab tent, in a hut made of leaves, in a mud

hut, and, in Sumatra, in a bamboo hut in a tree. His means of transport were equally varied. In addition to the bicycle, which he bought for £3, then sold at Aswan, he travelled by camel, on an ox-cart, and by lorry, often only enquiring where the vehicle was going after he was picked up, if he knew the local language.

In Sudan, Marin taught Esperanto to a group of ten students in Omdurman, but when the government in Khartoum heard about the course, he was refused permission to carry on.

In Addis Ababa he met a Czech Esperantist called Karlo Budvik. The two men each knew several languages, but Esperanto was the only one they had in common. Esperanto was of occasional use to him at a time when the language was little known. He met a man called Divekar in Bombay, and Mihir Kumar Sinha, whom this author believes to have been a brother of the more famous Sinha Lakshmiswar (1905–77). On the island of Java in 1934 he met Liem Tjong Hie, who had produced the first Esperanto booklet in Malay in 1933. In China he was the first white man to have spoken to Chen Tan in Esperanto.

Before setting off on his long journey in 1928, Marin applied for a visa allowing him to visit the British protectorate of Somaliland. The file on his application in the National Archives at Kew is revealing. It should be remembered that Esperanto was regarded with suspicion at that time. One note says, "I don't think that we ought to approach the RAI [Royal Anthropological Institute] at this time; nothing they could say would make him a desirable immigrant!". A further note suggests that "the presence of an isolated anthropologist among the excitable tribes of the Protec-



*Gassy Marin teaching Esperanto to Belgian anarchists*



torate may prove an embarrassment to the local government", adding that "Missionaries are forbidden in Somaliland on the same grounds".

The local Gloucestershire police and MI5 expressed clear views. The Colony (Whiteway) is described as "a settlement of cranks, socialists and communists..." We learn in the police report that "Marin ... has an income of about £4 per week which is derived from his mother's estate".

In response to a refusal by the Passport Office, on the advice of the Colonial Office, to grant him a visa, Marin wrote that he understood the decision "in view of my pacifist attitude during the (first) war. I should be extremely sorry if these views and the opinions of my youth were to stand in the way of my carrying out the scientific work for which I have been preparing for the past few years". He goes on to write that, "If some of my views could be considered unorthodox, I can certainly not be suspected of having any sympathies with bolshevism or with any other revolutionary movement."

Twenty years later Marin applied for naturalisation, which was granted, giving him in 1948 "to all intents and purposes the status of a natural-born British subject". Marin, the anarchist who in his youth had believed in "neither God nor master" had sworn an oath of allegiance "by Almighty God that I will be faithful to His Majesty, King George the Sixth, His Heirs and Successors, according to law".

When I met Gassy Marin in the summer of 1969 on a campsite near Helsinki, he was unofficially attending the *Universala Kongreso* there. He was not a registered congress member, but along with a small group who were with him, was benefiting from the international contacts possible when large numbers of



Gassy Marin with Karlo Budvik

Esperanto-speakers come together.

A modest booklet about this ethnographer and linguist called *G. Marin vizitas sian hejmon – la*

*mondon* was published by Internacia Kultura Servo in Zagreb in 1974, but much of his story remains to be told.

Hilary Chapman

RETE KAJ LETERE

BY E-MAIL AND LETTER

• Humuro ~ ofendiĝemo

Kara sinjoro,

Dum studado de originoj de lingvoj eble ni fokusas nenecese je preciza tradukado kaj ne sufiĉe instigas per emocio. Mi proponas tion, ĉar mi (komence) mal-kontentiĝis, studante Esperanton per bagatelaj salutoj; sed, tre baldaŭ mi komprenis, vive, ke vera respekto montriĝas per pli bona interkomprenado, pro kio ni devus ridi – esence, bagateloj

estas bonaj, kaj imagataj mal-faciloj estas malbonaj.

Mi deziras scii, ĉu ekzistas teologia esplorado de fruaj lingvoj, sed kiu tradukas humuron. Ŝajnas malgaje, ke foje (mi informiĝis) oni opinias *speaking with Tongues*, speciale miksiĝa kun ridado, mokinte, ĉar intelektuloj en supoze kristana situacio ne tuj akordiĝas. Ĉu simpatiaj amikoj akordiĝas?

Mi supozas, ke mi interesiĝas pri diverseco de sento de humuro

inter kulturoj, kaj en la frua Esperanta situacio, eble, speciale en Eŭropo. Ĉu ni devus ĝoji pli pri diverseco, kaj ne bezoni esti tiel diligenta pri ofendiĝemo?

Alan K. Watkins,  
Stourbridge



• **Peticio por la Eŭropa Unio de la skipo 'tuj.free.fr'**

Gesinjoroj,

Depost la komenco de februaro 2013, peticio lanĉita en la interreto ricevas subskribojn. Jes, senbrue, tago post tago kaj el la tuta mondo, homoj el pli ol 104 landoj hodiaŭ aprobis tiun alvokon lanĉitan de Ĵoaneso de Divonne (prononcu 'de Divon'), la aŭtoro de tiu peticio: "Esperanto, oficiala lingvo de la Eŭropa Unio, nun!" troviĝas ĉe ĉi tiu retadreso:

[www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto\\_langue\\_officielle\\_de\\_lUE/](http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto_langue_officielle_de_lUE/). Ĝi estas rekte alirebla en naŭ aliaj lingvoj (angla, araba, korea, germana, hispana, itala, japana, portugala kaj rusa). Evidente, la teksto de la peticio alireblas ankaŭ en Esperanto kaj, nuntempe, en dek kvar aliaj lingvoj: albane, ĉine, dane, hebreo, katalune, kartvele, litove, malte, okcitane, nederlande, pole, rumane, ukraine kaj vjetname, sed bedaŭrinde Avaaz, la posedanto de tiu hejmpaĝaro ne ebligas kromajn paĝojn rekte alireblajn. Nur ĉi-momente, ĉar ni esperas sukcesi, por ke la afero evoluu. La Esperanto-parolantoj kaj tiuj de la dek kvar lingvoj povas subskribi nur per la rekte alireblaj paĝoj kaj do per la koncernaj lingvoj. La peticio alireblas ankaŭ ĉe Fejsbuko: [www.facebook.com/Esperanto\\_oficialalingvodeEuropaUnioNun](http://www.facebook.com/Esperanto_oficialalingvodeEuropaUnioNun).

Notindas, ke Ĵoaneso estas dekses-jara junulo, el Kostariko. Tie li daŭrigas sian gimnazian studadon. Li ekhavis la ideon lanĉi tiun peticion, kiel defion al la tuta mondo por generi dank' al provokema titolo la aperon de civitaneca pripenso planed-skale.

Ni estas nun eta skipo laboranta por tiu peticio. Ni komencas trankvile, bonorde kaj malrapide. Ni opinias, ke ni devas rigardi la aferon longdaŭra.

Sciu, ke la 5 000a subskribo atingis nin je la 16a de majo. Temas pri homo el Sudano.

Gravegas, ke vi eksciuj la fakton, laŭ kiu ni konstruas tutnovan hejmpaĝaron dediĉitan al la peticio kaj al ĉio, kio ĉirkaŭas. Ĝi estos la nervocentro de nia agado. Jen nia retadreso: [www.tuj.free.fr](http://www.tuj.free.fr).

Bonvolu ne heziti disvastigi la informojn kaj diskonigi la peticion.

Provizore bonvolu respondi al ĉi tiu retadreso: [thierry\\_saladin@yahoo.fr](mailto:thierry_saladin@yahoo.fr).

La skipo de [tuj.free.fr](http://tuj.free.fr),  
Francio

## ***Texts of Esperanto songs now on-line***

Singing in Esperanto remains a feature of all sorts of international meetings, although there has been less communal singing in British Esperanto circles in recent years. A good collection of songs, compiled by Mary Larrad and John Brownlee, was published by the then British Esperanto Association about forty years ago, but is now hard to find.

The texts of over 3,000 songs, with some music, can now be found on-line. Some of them are original Esperanto songs, but many are translations. The compilation at <http://kantaro.ikso.net/> is of necessity incomplete, but it does include such favourites as *Feliĉa vagemul'*, *Venecia gondolkanteto*, the work of Clarence Bicknell, *Dek boteloj*, the work of Harry Holmes, *Iu, iu, iu* with lively words by Raymond Schwartz, a song which I have heard in at least half a dozen countries, and Harrison Hill's *La fluanta tajdo*.

The translators of *Londonaj stratoj* are not named, but I believe them to be Ian Carter (Jano), Peter Weatherby and Frances Sly.

Missing is *Sur monto sen ĉapel'*, a version by J.C. Wells of *On Ilkla Moor baht 'at*.

This compilation is largely the work of Russian Aleksej (Ljoa) Kuznecov, who appeals for help in finding some missing sets of words.

Hilary Chapman  
8 Vardre View, Deganwy, Conwy, LL31 9TE  
[patbillchapman@gmail.com](mailto:patbillchapman@gmail.com)

## **MALLONGE**

• **Universitato de Amsterdamo**

La kuratoroj de la katedro Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo rekomendas la italan lingvoscienciston Federico Gobbo kiel la novan katedrestron. Li transprenos la taskon de d-ro Wim Jansen, kiu ĉi-jare emeritiĝos. Ekde septembro 2013 UEA transprenos la respondecon pri la katedro, kiu estas la sola universitata katedro pri tiu fako en la mondo. Duonon de la kostoj kovros la asocio Esperanto Nederland.

• **Scienca kunlaboro bulgara**

Je la 29a de majo prof. Bojidar Leonov ([leonov.ĉe.rozabg.com](http://leonov.ĉe.rozabg.com))

*Daŭrigo sur paĝo 21*

# A selection of contemporary books from EAB's book service

• Please add 20% for postage – minimum postage cost £1.50; cheques payable to 'EAB' or phone Esperanto House on 0845 230 1887 to make a purchase by debit (or credit) card. Go to <http://www.esperantogb.org/eab/bookcat> for the full list of goods. EAB's stock is limited by space, but we could order a special title for you from UEA and let you pay EAB in sterling.

**La arto labori kune** redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins  
Rotterdamo: UEA, 2010. 901p. Panorama 'festolibro' de diversstaj artikoloj de 106 aŭtoroj, eldonita okaze de la 70a datreveno de elstara esperantisto Humphrey Tonkin. £48.00.

**Ĉirkaŭ la mondo dum 80 tagoj** Jules Verne. Elfrancisgis Jean-Luc Tortel.  
Kaliningrado: Sezonoj, 2008. 224p. Ĝinda legaĵo pri eksmoda vojaĝ-aventuro; Phileas Fogg provas pro veto ĉirkaŭnavigi la mondon en 80 tagoj. £16.00

**Dio, psiĥo kaj mi** Claude Piron  
Vieno: IEM, 2007. 173p. Romano profunde ligita kun la profesio de la aŭtoro. Dialogaro inter psikoterapiisto kaj paciento kun neordinaraj mistikaj travivaĵoj. £12.45


**The Esperanto Language** Frank Nuessel  
Ottawa: Legas, 2000. 153p. Chapters include 'The Esperanto Language', 'A Zamenhof biography', 'The Esperanto Movement'. The author was a linguistics professor at the University of Louisville. £25.40

**Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof** Aleksander Korĵenkov  
Kaliningrado: Sezonoj, 2009. 320p. Nova biografio de la iniciatinto de Esperanto, unue publikigita okaze de la 150-jariĝo de lia naskiĝo. Volumo 8 en la serio 'Scio'. £21.50

**Konto de l' vivo** Paul Gubbins  
Antverpeno: FEL, 1998. 139p. Kvar unuaktaĵoj jen seriozaj jen farsaj, el kiuj du premiitaj en Belartaj Konkursoj. £11.40

**La lupino kaj aliaj rakontoj** Saki (H.H. Munroe). Elangligis Edmund Grimley Evans. Kembrigiĝo: 2005. 154p. 20cm. Sprita humuro, eleganta stilo, acerba satiro kaj, foje, nuanco de krueleco. £8.00

**Mi estas homo** L.L. Zamenhof. Kompilis kaj redaktis A. Korĵenkov.  
Kaliningrado: Sezonoj, 2006. 287p. 76 originalaj tekstoj kaj intervjuo, kiuj prezentas sufiĉan bildon de la mondorigardo de Zamenhof. £16.35



**Morto de artisto** Anna Löwenstein  
Antverpeno: FEL, 2008. 619p. Historia romano pri la amikeco inter juna sklavino kaj la onta Romia imperiestro Nerono. £16.40

**La ŝtona urbo** Anna Löwenstein  
Antverpeno: FEL, 2008 (4a eldono). 348p. Romano. Juna kelta sklavino konatiĝas kun Romo kaj frua kristanismo. £19.99

**La tero, kiu volis forflugi** Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova  
Moskvo: Impeto, 2009. 110p. Du fikciaj, filozofiaj noveloj, kiuj pensigas kaj revigas. £8.65

**Proverbaro Esperanta** L.L. Zamenhof  
La Laguna: Régulo/Stafeto, 1974. 168p. 2 630 Zamenhofaj proverboj. Enkonduko kaj postparolo de Gaston Waringhien. £5.25

**Vojaĝo en Esperanto-lando** Boris Kolker  
Rotterdamo: UEA, 2005 (3a eld.). 280p. Enkondukas Esperantajn literaturon, historion kaj kulturon. Ekzercoj kaj kvizoj sekvas ĉiun ĉapitron. (Used in EAB's 'Advanced' correspondence course.) £15.90

**Zamenhof – Creator of Esperanto** Marjorie Boulton  
London: Routledge & Kegan Paul, 1980 (reprint). 12 + 223p. Classic English-language biography. £4.00

# **Brokantaj libroj** – all prices below include postage and packing

**La danĝera lingvo** Ulrich Lins

Moskvo: Impeto, 1990. 568p. 20cm. HB. Detailed history of the attacks against the Esperanto movement, particularly under Hitler and Stalin but also in Tsarist Russia, Eastern Asia and in the League of Nations. £5.60 (price new at UEA €21)

**D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde Robert** Louis Stevenson Elangligis A. Goodheir  
Glasgovo: Kardo, 1980. 68p. 21cm. PB. £1.60

**Esperanto sen mitoj** Ziko M. Sikosek

Antverpeno: FEL, 2003. 367p. 20cm. A well-researched and objective history of the language. £3.90

**International Language for Scouts** George Rust.

Letchworth: publ. not indicated, 1952. 74p. 18cm PB. £1.00

**La lada tambureto** Günter Grass Elgermanigis Tomasz Chmielik.

Pollando: Kleks, 2000. 21cm. HB. £3.60

**Ni parolu Esperanton** R.H.M. Markarian

Londono: University Tutorial Press, 1964. 42p. 21 cm. PB. £1.60

**Paĉjo, kio estas rasismo?** Tahar Ben Jelloun. Roterdamo: UEA, 1999. 52p. 19cm. PB. £1.20

**Pinokjo** Elitaligis Mirza Marchesi. Londono: The Esperanto Publishing Co. Ltd, 1930. 150p. 19cm. HB. £2.10

**Plena ilustrita vortaro de Esperanto** Redaktis G. Waringhien.

Parizo: SAT, 1970 (1a eld.). 1230p. 26cm. ilus. HB. La 'norma' internacia vortaro de Esperanto, konata kiel 'PIV', kun difinoj en Esperanto – necesa por ĉiu serioza parolanto. £20

**Reĝo Edipo kaj Antigona.** Sofoklo. Elhelenigis D.B. Gregor.

Eleganta traduko. La Laguna: J. Régulo/Stafeto, 1960. 216p. 22cm. PB. £3.60

**Rusa novelaro (la 19a jarcento)** kompilis Korjenkov kaj Lozgaev.


Kaliningrado: Sezonoj, 2003. 400p, 20cm. Klasikaj noveloj. £4.10

**Secondary School Esperanto II** R.H.M. Markarian & J.H. Sullivan

Londono: University Tutorial Press, 1979. 180p. 22cm. PB. £2.10

**Sed homoj kun homoj** Ziko M. Sikosek.

Rotterdamo: UEA, 2005. 197p. 24cm. Illus. A history of the World Esperanto Congress (Universala Kongreso) from 1905 to 2005. The title is taken from Zamenhof's address at the first event: "today we meet, not as Frenchmen with Englishmen, Russians with Poles, but as People meeting People" (Price new at UEA £14.70), this book £5.00



**Step by Step in Esperanto** M.C. Butler.

Aŭstralio: The Esperanto Publishing Company, 1979. 280p. 18cm. HB. £2.50

**Vikipedio praktika manlibro** Yves Nevelsteen (ed.)

Slovakio: Espero, 2007 (2a eld.). 37p. 14cm. Kolore ilus. Vikipedio estas la Esperanta versio de *Wikipedia* – la plej ampleksa enciklopedio en la interreto. Ĉi tiu manlibro klarigas, kio ĝi estas kaj kiel vi povas kontribui al ĝi. £1.80

**La vivo de la plantoj** Paul Neergaard.

La Laguna: J. Régulo/Stafeto, 1957. 128p. 24cm. PB. £2.00

**Vojaĝoj kaj aventuroj de Sinjoro Longkrurulo** Dreves Uitterdijk.

Nederlando: 1927. 75p. 18cm PB. £1.60

\*\*\* We've received many kind donations recently and now have a good stock of second-hand books. Please feel free to pop in and browse the collection \*\*\*



subskribis oficialan kontrakton pri kunlaboro inter Bulgara Akademio de la Sciencoj (BAS) kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) Bulgario, surbaze de kiu ili organizos komunajn sciencajn aranĝojn, kies oficialaj lingvoj estos la bulgara kaj Esperanto. Okazos sciencaj aranĝoj de BAS, dum kiuj al la ĝis nun uzataj oficialaj lingvoj (la bulgara, rusa, angla, germana, franca) oni aldonos Esperanton.

Krom tio, AIS-Bulgario partoprenos komunan scienc-esploran agadon kune kun la sciencistoj de BAS.

Ili komencas sian kunlaboron, organizante kune la Simpozion AEPA en Karlovo (29 junio–3 julio 2013), kun ferieblecoj kaj ekskurso al Grekio.

• **Unesko-teksto pri terminologio nun ankaŭ en Esperanto**  
Jam de iom da tempo aperas en la retejo ([www.infoterm.info/publications](http://www.infoterm.info/publications)) de Infotermo de Unesko la traduko *Gvidlinioj pri terminologiaj politikoj* oficiale en Esperanto. Infoterm skribis komunikon al ĉiuj siaj membroj por informi pri tio.

• **Esperanto kiel denaska lingvo**  
Bonvenaj estos science validaj proponoj por kontribuo pri Esperanto kiel denaska lingvo, Esperanta infana lingvaĵo kaj simile. (vidu la temaron de la konferenco en la retejo [www.iascl2014.org](http://www.iascl2014.org)). Oni aparte atentigis, ke oni ĝojus pri Esperanta premiero en siaj rondoj. (Informis d-ro Wim Jansen, Universitato de Amsterdamo.)

• **Esperanto en Mazara del Vallo**  
En Mazara del Vallo, Sicilio, okazis pasintan aŭguston la 79a Itala Kongreso de Esperanto. Dum ties preparado italaj esperantistoj kontaktis la urban estraron kaj renkontis plenan apogon de sia iniciato kaj eĉ pli: ekestis propono de la urbestro,



• **Clarence Bicknell Association appeal**

We've noticed that the new Clarence Bicknell Association has its logo in Esperanto, and the photo of Clarence Bicknell shows him wearing his Esperanto star. The Association is making an appeal on their website – [www.clarencebicknell.com](http://www.clarencebicknell.com) – for someone to do some translation into Esperanto for them.

Nicola Cristaldi, ke Mazara del Vallo estu Esperanto-centro de Italio aŭ ĉe tuta Mediteraneo. Pro tio komenciĝis la granda laboro, kiu celas establi Esperanto-centron, okazigi kulturajn aranĝojn, ekinstrui Esperanton en mezgradaj lernejoj kaj simile. En januaro pasintjare jam estis fondita *Centro por Esperanto kaj Interkulturo*, kiu ricevis ejon en kvin-etaĝa domo, nomita *Palazzo della Legalità* 'Palaco de la Leĝeco'.

• **Madagaskaraj studentoj**  
Instruado de Esperanto en universitato, ĉe ĝia beletra fakultato, prosperas seninterrompe dum 17 jaroj. Studentoj el diversaj fakoj lernas kun entuziasmo kaj diligento. Centro Internacia de Esperanto (CIE) organizas ĉiujare dunivelajn ekzamenojn. La kursoj estas senpagaj kaj nedevigaj, kaj ekzistas ankaŭ koresponda kurso. En majo ĉi-jare CIE

organizis la dutagan Esperanto-aranĝon "Tagoj de la internacia lingvo" kun ekspozicio. Por sia agado CIE bezonus komputilon: Centre International d'Espéranto, Boîte postale 3171, MG-101 Antananarivo; rete: [ciemad70@yahoo.fr](mailto:ciemad70@yahoo.fr).

• **Fakaj Asocioj**

Detalaj rezultoj de la interreta enketo pri Fakaj Asocioj, farita de la estrarano de UEA por Scienca kaj Faka Agado, Amri Wandel, troviĝas en [https://docs.google.com/file/d/0B0vromzI\\_9AfUnRfWGZyVIRLQmc/edit](https://docs.google.com/file/d/0B0vromzI_9AfUnRfWGZyVIRLQmc/edit). El 22 respondintaj Fakaj Asocioj, 20 havas propran retpaĝaron, 12 publikigas sian bultenon ankaŭ aŭ nur rete. La retliston sciencaj-faka-agado@yahoogroups.com regule sekvas 13 el la respondintaj Asocioj. En la listo membras ĉirkaŭ 200 asocioj kaj unuopuloj. La datumoj pri la Fakaj Asocioj aperas en [http://uea.org/agadoj/faka\\_agado.html](http://uea.org/agadoj/faka_agado.html).

- **Nepala kongreso**

La 11a Nacia Kongreso de Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) okazis la 11an de februaro en la lernejo Padmakanya, Dillibazar, Katmanduo. Partoprenis 65 esperantistoj, pli ol duono de la tuta membraro. La reelektita prezidanto estas s-ino Indu Devi Thapaliya.

- **Solidareco**

Por membri nepagipovajn esperantistojn, Fondaĵo Canuto de UEA pasintjare ricevis de unuopaj donacintoj la sumon de €6 565. Krome, Fondaĵo Azio kontribuis €8 000, kaj Instituto Hodler €5 000. Entute eblis membri 871 aktivulojn tra la mondo. Triamonda Kongresa Fondaĵo ricevis €3 800, kaj krome Heidi Goes aparte kampanjis por venigi indonezianojn al la UK en Hanojo.

- **Nova revuo pri ekonomio, socio kaj medio**

En San-Paŭlo, Brazilo, Legio de Bona Volo (LBV; [www.paivanetto.com.br/index.php/esp](http://www.paivanetto.com.br/index.php/esp)), ekeldonas novan revuon *Bona volo*, kiu pritraktas la ekonomion, socion kaj medion. Ili bonvenigas viajn komentojn. La eldonaĵo atingeblas per la ligilo: [www.boavontade.com/pdf/BonaVolo/BV-Meio-Ambiente.pdf](http://www.boavontade.com/pdf/BonaVolo/BV-Meio-Ambiente.pdf).

LBV aperigis ankaŭ filmeton pri naturprotektado, kun subteksto en Esperanto. Vi povas spekti ĝin en la ligilo: [www.youtube.com/watch?v=aLoedHXkWB8](http://www.youtube.com/watch?v=aLoedHXkWB8). □

## Nekrologo

La 7an de aprilo mortis **Irene Lock**, konata pro sia rolo kiel lordino Bracknell en la teatraĵo *La graveco de la fideleco* de Oscar Wilde. Irene estas ame memorata de sia edzo Norman.

## Orienta Federacio en la interreto

Nun la Orienta Esperanto-Federacio havas sian propran retpaĝon, kiun konstruis Roy Simmons. Oni povas viziti ĝin ĉe [www.greenrats.org.uk/oef.htm](http://www.greenrats.org.uk/oef.htm).

## Esperanto-kastelo Greziljono

La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj: somera programo (semajnoj turisma, art-amatora,

alternativa, infana, teatra), aŭtuna feriado oktobrofine kaj al jarfina festego kun novjara festeno.

Vidu detalon rete en [www.gresillon.org/somero](http://www.gresillon.org/somero). Kontaktu nin telefone al +33-2 41 89 10 34 aŭ al [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org); letere al MCE Grésillon, St.-Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé en Anjou.

### Facile flugi al Greziljono

Aldona informo utila estas, ke somere funkcias rekta flugo de EasyJet inter Stansted kaj la flughaveno Angers Marcé (kodo ANE), kiu situas nur 20 kilometrojn de Greziljono. □



Du fotoj de la kunveno de Liverpoola Esperanto-Rondo, kiu okazis la 23an de marto en Univeritato de Liverpoolo – The Waterhouse Café kaj Muzeo kaj Galerio Victoria.

## Loka sukceso disvastiginda

La unuaj renkontiĝoj en Birmingham bone sukcesis. La venontan ni aranĝis por la 28a de julio. Fakte ĝi ne estas renkontiĝo; pli vere ĝi estas babilgrupo en trinkejo. Ofte partoprenis ne-britaj esperantistoj, do la babilado vere estas internacia.

La ideo naskiĝis de la retpaĝaro [www.meetup.com](http://www.meetup.com), kiu informas pri renkontiĝoj, kie oni povas babilu kun aliaj, kiuj havas la saman intereson.

Informojn pri la Esperanto-grupo vi povas legi ĉe [www.meetup.com/esperanto-birmingham](http://www.meetup.com/esperanto-birmingham). Se tio interesas vin, aliĝu al la grupo kaj vi ricevos detalojn retroŝte, tute senkoste.

### Se la ideo kreskus nacie ...

Fakte EAB pagis por la abono al [meetup.com](http://meetup.com), kaj certe pli



La 26an de aprilo babilas Phillip el Birmingham, Ann el Lichfield, Catherine el Birmingham, John el Wolverhampton kaj Elizabetta el Italio.

valorus, se ankaŭ aliaj urboj aranĝus similajn rekontiĝojn en siaj urboj pere de la paĝo de Birmingham. Se la ideo kreskus nacie, ni povus eble ŝanĝi la

nomon al iu pli taŭga. Se vi volas provi babilgrupon en via urbo, kontaktu: [john.gobourne@btopenworld.com](mailto:john.gobourne@btopenworld.com).

John Gobourne

## Aŭtuna kunveno en Chester

La Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio kore invitas vin al sia Aŭtuna Kunveno 2013, kiu okazos je sabato, la 28a de septembro en Hotelo Westminster, City Road, Chester CH1 3AF (tel. 01244 317341). La hotelo troviĝas nur kelkajn metrojn for de la stacidomo.

Bonvolu alveni post 11h30, ekde kiam ni sociumos en la hotela trinkejo Deva, kie oni povos aĉeti ankaŭ biletojn por la loterio, kaj eventuale novajn kaj brokantajn librojn ks. Je la 13a horo oni servos abundan – kaj laŭditan – bufedan tagmanĝon. Vegetaraj kaj veganaj pladoj haveblas laŭ antaŭmendo.

Post la lunĉo oni kunvenos por mallonga aferkunsido. Poste, la ĉefa ero de la programo estos la parolado memore al Antonia Rostron-Van Ess, far Richard Howard el Northampton.

Richard lastatempe revenis al la movado post plurjara foresto. Li parolos pri sia vivo kiel esperantisto en Britio kaj aparte en Prago, kie li laboris kiel redaktoro ĉe la Ĉeĥoslovaka Radio.

Oni servos al ni per teo/kafo kaj biskvitoj post la parolado. Okazos eltirado de la loteribilettoj. Oni povos interbabilu ĝis venos la horo por disiĝo, ĉirkaŭ 16h30.

La kosto estas £16,50 inkluzive de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Por partopreni, bonvolu sendi ĉekon al EAB (Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; kun noto, ke temas pri 'Aŭtuna Kunveno de NOEF'). Aŭ, prefere, mendu kaj pagu perrete. Se eble, bonvolu uzi *debit*karton por via mendo (ĉar tiel niaj procentaĵo-kostoj estas malpli.)

La limdato por aliĝo estas la 21a de septembro, kiam ni devos sciigi la hotelon pri la preciza nombro de partoprenantoj. Venu amase al bela, interesa Chester! (Ni bonvenigas premiojn por la loterio, esperantaĵojn kaj brokantajn librojn.)

Por informoj aŭ helpo – ankaŭ en Chester – kontaktu: 07703 310 610.

\*\*\*

Ceteraj kunvenoj de NOEF okazos sabate, la 27an de julio en Liverpolo, la 14an de decembro en Manĉestro kaj la 26an de aprilo 2014 en Preston.

### Membership news

#### New members

Robin Stinson, Hornchurch  
Yida Xu, London

#### Deceased member

Adrian Pilgrim, Isle of Man

## **Amantoj de teatro serĉataj**

### **– Teatra semajfino en Francio**


La Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono proponas ĉi-somere Teatran Semajnon, de la 10a ĝis 17a de aŭgusto, kun teatro-kurso en Esperanto, Esperanto-kurso pri teatro kaj konversacia kurso, kun dancoj kaj kantoj kaj kun individuaj sesioj pri parfum-elekto, kun tri vesperaj spektakloj: Farso pri UKoj, teatraĵo pri Galileo, kanzonoj en Esperanto. Bonvolu vidi la retpaĝaron [gresillon.org/s5](http://gresillon.org/s5).

Lerni kaj praktiki Esperanton ludante, teatre, en loko ideala por esperantistoj, estas des pli interese, kiam la gvidantoj estas profesiaj teatristoj el alilando. Georgo Handzlik el Pollando kaj Saša Pilipović el Serbio proponas neforgeseblan momenton de spertigo, sed ni estas malkvietaj, ke eble ni devos ĉion nuligi kaj ne venigi niajn du amikojn, ĉar ni ankoraŭ ne ricevis sufiĉe da firmaj aliĝoj. Bonvolu helpi nin trovi amantojn de teatro originala en Esperanto, dezirantajn labori kun profesia aktoro.

Se tiu staĝo aŭ ĝiaj datoj ne taŭgas, elektu inter kvar aliaj semajnoj en Greziljono ([www.gresillon.org/somero](http://www.gresillon.org/somero)).

François Lo Jacomo

## **Nova de Sezonoj**



- *La aventuroj de Ŝerloko Holms* de Arthur Conan Doyle. Elangligis I. Ertl, H. Firooznia, R. Fössmeier, E. Grimley Evans, P. Gubbins, S. Johansson, T. Steele kaj R. Williams. Kaliningrado: Sezonoj, 2013. Serio Mondliteraturo, n-ro 18. 248p. 20cm. Dek du aventuroj, kiuj aperis dum la jaroj 1891 kaj '92.
- Menu de EAB kontraŭ £17 (plus 20% por sendokostoj).

*"The word 'monumental' is bandied about, but one wishes it were kept ... for occasions like this. ..."*

## **Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto**

*is a remarkable achievement, a compendious milestone of a reference book that promises to bring a neglected literary tradition new readers and foster new scholarship."* Esther Schor, Professor of English at Princeton University, in *Language Problems & Language Planning*, Vol. 33, No. 3, 2009.

- Preface by Dr. Humphrey Tonkin, Professor of the Humanities and President Emeritus at the University of Hartford, Connecticut
- General introduction to Esperanto literature, its history, evolution and modern development
- Individual introductions to the five periods of the literature
- Over 300 individual articles on the most important writers and their work in chronological order, with biographies and critique
- Sample literary texts from some of the best original authors
- Introduction to the language itself, its linguistic structure and creative capabilities, including *Esperanto from the Viewpoint of a Writer* by Claude Piron
- Extensive bibliographies and index

*Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007* by Geoffrey Sutton. New York, NY: Mondial, 2008. x + 728 pages. Format: 6" x 9" (152 x 229 mm). ISBN 978-1-59569-090-6. Price €66.00 + p.& p.

• Order online at <[www.librejo.com/enciklopedio](http://www.librejo.com/enciklopedio)>, by fax (+1-208-361-2863), or by e-mail: [informo@librejo.com](mailto:informo@librejo.com). Mondial will respond promptly with information on the various means and prices of carriage. Mondial (Ulrich Becker), 203 West 107th Street, Apt. 6 C, New York, NY 10025, USA.

Resale outlets should contact Mondial ([informo@librejo.com](mailto:informo@librejo.com)) to agree a price. Pay only after agreement on the cost of carriage. Payment may be made by US bank cheque in US\$; or by giro to a bank in Germany; or to Mondial's account at UEA, Netherlands. Also available from EAB for £52.80, including postage and packing.

